

## **Kulturdomo de Esperanto, Grésillon, Saint-Martin d'Arcé, 49150 Baugé en Anjou, Francio**

*Nekomerca kooperativa societo kun variebla kapitalo, registrita en Angers (49) n-ro 522 621 556.*

### **KUNVOKILO al la Jarkunsido la 13-an de majo 2023**

La jarkunsido estas kunvokita sabaton, la 13-an de majo 2023 inter la 14<sup>a</sup>00 kaj la 17<sup>a</sup>00. Ĝi okazos ĉeeste en Greziljono kaj rete aŭdvide partoprenebla. Vidu la teĥnikajn detalojn en la antaŭlasta paĝo.

La voĉdonoj okazos rete (per la retejo [balotilo.org](http://balotilo.org)) antaŭ kaj dum la kunsido. Societano, kiu ne povas aŭ ne volas voĉdoni per la retejo [balotilo.org](http://balotilo.org), bonvolu sendi sian voĉdonilon per poŝto aŭ retmesaĝo. Vidu instrukcion sur la lasta paĝo.

### **Tagordo**

- 1) Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la kunsido,
- 2) Nombrado de la ĉeestantoj,
- 3) Evoluo de la nombro de societanoj, kontrolo de la kvorumo,
- 4) Agadraporto 2022,
- 5) Financa raporto 2022, aprobo de la kontoj de la jaro 2022,
- 6) Imputo de la profito 2022,
- 7) Buĝeto 2022,
- 8) Kvitigo de la Komitato,
- 9) Rezulto de la statutaj voĉdonoj,
- 10) Komerca strategio,
- 11) Programo 2023,
- 12) Aliaj demandoj.

### **3) Evoluo de la nombro de societanoj**

La nombro de societanoj estas stabila: 251 la 31-an de decembro 2022 same kiel unu jaron antaŭe, kun 855 societaj partoj A (po 16 €), kontraŭ 866 fine de 2021, danke al 5 novaj societanoj kaj malgraŭ 3 forpasoj, 2 fordonoj de partoj, neniuj perdo de societaneco. Ankaŭ la nombro de partoj B malmulte progresis: 1 societano aĉetis 1 societan parton B (po 200 €), kio apenaŭ kreskiĝas nian societan kapitalon.

### **4) Agadraporto**

La jaro 2022 estis ne plu perturbata pro la sanitara krizo, ni povis agadi laŭ nia kutima programo dum la tuta jaro. Ni daŭrigis la renovigajn konstrulaborojn, kiujn ni surprenas de pluraj jaroj, kaj ankaŭ la plibeligon de la bieno.

La ludonojn kaj la staĝojn prizorgis administrantoj kaj aliaj volontuloj. La kuiradon, purigadon kaj servadon prizorgis ĉefe Thierry Charles, Christelle Perrot kaj Véronique Koalal.

En la jaro 2022, la kastelo estis okupita dum 242 tagoj, t.e. 66% de la tempo: 76 tagoj de esperantistaj eventoj, 5 tagoj de ne-esperantistaj eventoj, 102 tagoj de ludonoj, 54 tagoj de konstrulaboroj kaj 5 tagoj por la jarkunsido kaj komitatkunvenoj (ofte telefone aŭ rete). Inter januaro kaj decembro, 46 el la 52 semajnfinoj estis okupitaj. Vidu la agadon rete sub: [gresillon.org/a2022](http://gresillon.org/a2022).

- De la 31<sup>a</sup> de marto ĝis la 5<sup>a</sup> de aprilo, la tagoj “Fervojistoj kaj daŭripova movebleco” kunvenigis 24 personojn el 7 landoj.
- De la 22<sup>a</sup> ĝis la 30<sup>a</sup> de aprilo, la 10<sup>a</sup> staĝo Printempas kunvenigis 47 homojn el 10 landoj.
- De la 4<sup>a</sup> ĝis la 9<sup>a</sup> de majo, la korusa staĝo de Interkant kunvenigis 19 kantistojn.
- La 7<sup>an</sup> de majo, okazis festo pro la 70<sup>a</sup> datreveno de la Kulturdomo de Esperanto kun pli ol kvindek da ĉeestantoj. Filmon [https://www.youtube.com/watch?v=5\\_YCb7jdPOQ](https://www.youtube.com/watch?v=5_YCb7jdPOQ) oni realigis kaj prezentis dum la virtuala kongreso de UEA novembre.

La someraj staĝoj okazis dum 35 tagoj en julio kaj aŭgusto kaj kunigis 143 personojn.

- De la 4<sup>a</sup> ĝis 8<sup>a</sup> de julio, la 3<sup>a</sup> Verda Naturisma Semajno kunigis 20 aliĝintojn e-istajn kaj aliajn naturistojn.
- De la 23<sup>a</sup> de julio ĝis la 2<sup>a</sup> de aŭgusto, la 6<sup>a</sup> maratona Esperanto-kurso, paralele kun la 34<sup>a</sup> Internacia E-Konferenco, akceptis 26 lernantojn. 13 el ili trapasis la ILEI-ekzamenojn.
- De la 25<sup>a</sup> de julio ĝis la 4<sup>a</sup> de aŭgusto, la 8<sup>a</sup> semajno pri reciprokaj interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj kunvenigis 57 personojn.
- De la 16<sup>a</sup> ĝis la 25<sup>a</sup> de aŭgusto, la 12<sup>a</sup> festa semajno por infanoj kaj familioj gastigis 35 staĝanojn, el kiuj 11 infanojn.
- De la 17<sup>a</sup> ĝis la 24<sup>a</sup> de oktobro, 38 staĝanoj partoprenis la mult-aktivadan renkontiĝon kun koruskantado, esperantistaj biciklistoj (BEMI) kaj trikorusa koncerto en la koncertejo René d'Anjou en Baugé.
- De la 24<sup>a</sup> de oktobro ĝis la 3<sup>a</sup> de novembro, la 11<sup>a</sup> staĝo AŬTUNE kunvenigis 37 staĝanojn, inter ili 8 infanojn.

Sume, en la jaro 2022, dum la 76 tagoj de staĝoj ĉeestis 309 homoj, rekorda nombro (209 en 2021, 205 en 2020, 275 en 2019, 279 en 2018, 278 en 2017, 254 en 2016, 242 en 2015, 204 en 2014) por 5 483 manĝoj kaj 2 338 tranoktoj.

Ni memorigas, ke la prezoj de la staĝoj ne plialtiĝis de dek unu jaroj kaj ke duon-tarifo validas por infanoj, junuloj, senlaboruloj kaj personoj kun malaltaj vivrimedoj, celante instigi esperantistojn al vizitado. Bonvolu informi pri tio viajn konatojn. En la nuna monda situacio, ni ne povas promesi, ke daŭros sama konstanteco, sed ni ja klopodos konservi ĝin tiom longe kiom eblos. Ĝis nun, kreskis nur la prezo de la manĝoj, de 23 ĝis 25 € tage.

Krom la staĝoj organizataj de la Kulturdomo, aliaj eventoj estu menciataj:

- De la 14<sup>a</sup> ĝis 15<sup>a</sup> de majo, SAT-Amikaro organizis sian 73<sup>an</sup> Kongreson,
- De la 2<sup>a</sup> ĝis la 3<sup>a</sup> de julio, la asocio FestiNATUR' organizis la 2<sup>an</sup> festivalon "Naturist' por nova mondo" kun 120 pagitaj enirbiletoj kaj budo de Espéranto-France.
- Ni provis organizi renkontiĝon pri libro-subskribado kaj atelieron pri skriba verkado, kaj ankaŭ staĝon pri balkanaj dancoj, sed tiuj ĉi ne okazis.

## **Ludonoj**

Jam la dekan jaron la Kulturdomo financas sin per ludonoj al privatuloj. Entute realiĝis 37 ludonoj, el kiuj 6 dum la semajnezaj tagoj. Krome, la ĉambron 37 alireblan per rulseĝo oni luis 11-foje al privatuloj. La komerca disvolviĝo ja atingas kelkajn rezultojn, tamen necesigante novspecan mastrumadon.

## **Konstrulaboroj kaj bonteno de la bieno**

Dum 54 tagoj dediĉitaj al laboroj, kaj ankaŭ dum la ludonoj kaj staĝoj, ni daŭrigis la plej diversajn laborojn.

Oni plejparte malembarasis la kampojn de invadantaj laŭroj. Mortintan cedron oni dehakis. La arbustojn apud la lageto kaj la rivereto Vieille Coulée oni fortranĉis. El la baseno oni forportis ĉirkaŭ 50 m<sup>3</sup> da ŝlimo. Parklokon por la kamiono de fajrobrigadistoj oni kreis antaŭ la baseno. *Ni notu, ke en aŭgusto, fajrego detruis 1280 hektarojn da arbaro ĉirkaŭ 10 kilometrojn norde de Greziljono.*

Plurajn pordojn oni farbis. Dudekon da fenditaj kaheloj oni anstataŭigis. Sonŝirman tegaĵon oni metis sur la plankon de la ĉambroj 16 ĝis 19 kaj en la koridoron inter tiuj ĉambroj. Elektron oni konektis ĝis la hangaro kaj du klemoj por kampadistoj. Malfibrilaciilon oni aĉetis (kaj lokis sub la verandon, inter la biblioteko kaj la oficejo).

Novan vapor-forkondukilon oni instalas en la kuirejon konforme al la sekurecnormoj: ne plu necesas grimpi sur la tegmenton por atingi ĝian motoron. Koncerne la tegmenton de la kastelo, la kuirejan alon oni renovigis komence de 2022: restas du konstruperiodoj planitaj en 2023 por la ĉefa parto de la kastelo.

Ni danku al René Jelenc, Bert Schumann, Jannick Huet, Frédéric Lauriol, Hervé Riou, Nathalie Rigault, Ron Winteraeken, Alain Descarpentries, Yves Couturier, Emmanuel Morin, François Lo Jacomo, Jim Bayard, Miko Sloper, Juan del Castillo, Frédéric Neyret, Vincent Gerbe, Botan Debanne kaj Xavier Godivier, kiuj partoprenis tiujn volontulajn laborojn en 2022.

## **Komerca disvolviĝo**

Ni daŭrigas serĉadon de klientaro cele al kreskigo de la vendosumo per pli konstanta okupado de la kastelo, ĉefe dum la semajnezaj tagoj. Pierre Soubourou kaj Jannick Huet estigis laborteamon kun staĝantaj studentoj (Flavie ĝis fino de aŭgusto,

Ron de julio ĝis novembro).

Ni provas organizi restadojn kun specifaj aktivaĵoj (jogo, biciklado, akvarelo, kantado ktp.) por grupetoj, kunlabore kun aliaj organizoj kaj uzante tiucelajn fakajn retejojn.

## 5) Financa raporto

En ĉi tiu jaro 2022, la klasikaj enspezoj de la Kulturdomo atingis: staĝoj 53 396 € (44 044 € en 2021) kaj luoj 118 594 € (55 474 € en 2021, 68 800 € en 2019). Ekzamenado de la kontoj montras, ke ĉi tiu spezo ebligis kompensi la funkciadajn kostojn. Donacoj malaltiĝis al 4 823 € (12 367 € en 2021). La profito atingas 65 256 € post imposto kontraŭ 83 527 € en 2021 (kiam ni ricevis senimpostan helpon pro pandemio).

Trian fazon de riparado de la tegmentoj ni plenumis: 33 263 € por la kampadeja lavejo kaj la kuireja alo (finitaj en januaro 2022). Pro la ĉiujaraj prizorgaj laboroj de la kastela tegmento ni krome pagis 863 €.

Pri la disponeblaĵoj, je la 31<sup>a</sup> de decembro 2022 ni havas entute 360 883 €, el tio 8 377 € en ĝirkontoj, 334 573 € en ŝparkontoj (A-ŝparkonto + ŝparkonto de Banque Populaire), 17 836 € en societaj partoj de la banko Banque Populaire kaj 97 € kontante en la kaso.

*La financaj tabeloj (bilanco, spezkonto, buĝeto) estas publikigitaj en nia retejo, dise de la jena kunvokilo. Kelkajn ekzemplerojn oni printos.*

## 6) Imputo de la profito 2022

Konforme al nia statuto, ni proponas al vi aprobi la jenan imputon de la profito en 2022:

Profito neta post imposto:	<b>65 255,73 €</b>
Imputo al la leĝa rezervo 15 %:	<b>9 788,36 €</b>
Pago de interezoj je societaj partoj B:	<b>2 731,77 €</b>
Dividendo al societanoj:	nenio
Altigo de kapitalo:	nenio
Fonduso por disvolviĝo:	<b>52 735,60 €</b>

## 10) Komerca strategio

Komence de la jarcento, ni travivis gravajn financajn malfacilaĵojn ĉar la kastelon oni rezervis al kelkaj esperantistaj agadoj, ne sufiĉaj por bonteni ĝin. De deko da jaroj, la luado de la kastelo krom la Esperanto-staĝoj finance resanigis nian kooperativon, tamen ni alfrontas nun novajn problemojn:

- La tutan prizorgadon plenumas eta nombro da volontuloj, ĉefe Bert kaj René, de kiuj plejparte dependas interalie la “permanentoj” (respondeco pri la kastelo dum staĝoj kaj luadoj). Urĝas trovi kaj trejni novajn volontulojn...
- Planata solvo konsistas el dungado de deĵorantoj kaj pligrandigo de la nombro de luadoj por kreskigi la enspezojn. Sed inter mastrumado kvazaŭ-asocia kaj mastrumado plene komerca, grandan distancon necesas trapaŝi: tia evoluigo ne tuj malpliigos la laboron de la administrantoj, interalie malfacilas konfidi al dungitoj la permanentojn, kaj necesos ja tempo antaŭ ol tia strategio iĝos vere profitdona.

Ĉu bremsi aŭ akceli nian komercan disvolviĝon? Kvankam membrokunveno ne disponas sufiĉajn elementojn por tion decidi, ŝajnas grave diskuti pri tio ĉar novaj administrantoj, kiujn ni ĉiuokaze nepre bezonas, troviĝas inter la nunaj societanoj. Du el la nunaj administrantoj ne plu estos reelekteblaj venontjare.

## 11) Programo en 2023

- 14 - 23 aprilo            staĝo PRINTEMPaS, intensaj kursoj kaj parto de KER-ekzameno
- 24 - 30 aprilo            Korusa kunveno de Interkant kaj BEMI-semajno
- 02 - 07 julio             Verda Naturisma Semajno
- 07 - 17 julio             Maratona Esperanto-kurso kaj Konferenco IEK
- 18 - 25 julio             Kongreso de SAT
- 25 julio - 4 aŭg         REF, Verdaj Skoltoj, Festa Semajno por infanoj kaj familioj
- 07 - 17 aŭgusto         Interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj
- 17 - 24 oktobro         Semajno de esperantistaj biciklistoj
- 16 - 22 oktobro         Korusa kunveno de Interkant
- 23 okt - 02 nov         Staĝo AŬTUNE

Vi povas informiĝi pri niaj staĝoj kaj aliĝi diversmaniere:

- en nia retejo ĉe: [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo) kaj: [gresillon.org/aligo](http://gresillon.org/aligo)
- rete al: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org) aŭ [gresillon@gmail.com](mailto:gresillon@gmail.com)
- telefone al: **+33 2 41 89 10 34** (aŭtomata respondilo) aŭ **+33 6 51 24 24 23** (Bert)
- poŝte al: MCE / Schumann, 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné

La Kulturdomo bezonas vian helpon! Dankon pro aliĝo kaj aligo de viaj amikoj..